

Enhavo

1	Pasintaj aranĝoj.....	2
1.1	<i>George Soros</i> en Esperanto-simpozio en Novjorko.....	2
1.2	Korekto pri la 33-a Esperantologia Konferenco en Havano.....	3
1.3	La 20-a konferenco de GIL en Berlin.....	3
2	Estontaj aranĝoj.....	3
2.1	La 34-a Esperantologia Konferenco kadre de la UK en Kopenhago.....	3
2.2	Interlingvistika konferenco en Tartu omaĝe al <i>Aleksandr Duliĉenko</i>	3
2.3	Konferenco okaze de la 400-a naskiĝtago de <i>Thomas Urquhart</i>	3
2.4	La 21-a konferenco de GIL en Berlin.....	4
3	Faklingva komunikado.....	4
3.1	Novaj faklingvaj libroj.....	4
3.2	<i>Charles Darwin</i> kaj <i>Noam Chomsky</i> en Esperanto.....	4
3.2.1	<i>Charles Darwin</i>	4
3.2.2	<i>Noam Chomsky</i>	5
3.3	Lexicon silvestre – eseoj de Karl-Hermann Simon pri forstfaka vortaro.....	5
3.3.1	La libro.....	5
3.3.2	Enkonduko (<i>Detlev Blanke/Stefan Panka</i>).....	6
4	Personoj kaj iliaj verkoj.....	8
4.1	<i>KURISU Kei</i> (<i>Ulrich Lins</i>).....	8
4.1.1	Homo kaj vivo.....	8
4.1.2	Verkoj de <i>Kurisu Kei</i>	9
4.2	<i>Renato Corsetti</i> – okaze de lia 70-jariĝo.....	12
4.2.1	Biografio.....	12
4.2.2	Publikaĵoj.....	13
4.3	<i>Detlev Blanke</i> - okaze de lia 70-jariĝo.....	20
4.3.1	Biografio.....	20
4.3.2	Publikaĵoj - Elektro.....	20
5	Pri Esperanto en lingvistikaj verkoj.....	27
6	Denove sukcesa semajno en Poznan (<i>Ilona Koutny</i>).....	28

1 Pasintaj aranĝoj

1.1 George Soros en Esperanto-simpozio en Novjorko

“De Zamenhof al Soros” estis la titolo de la ĉi-jara simpozio organizita de la Novjorka Oficejo de UEA. Tiu oficejo, kies ĉefa tasko estas prizorgi la rilatojn de UEA kun la ĉefsidejo de Unuiĝintaj Nacioj, ĉiujare organizas publikan aranĝon okaze de Zamenhof-tago la 15-an de decembro.

Ĉi-foje temis pri historia trarigardo de la komenca periodo de Esperanto, organizita por rekonigi du novajn librojn: anglalingvan biografieton de Zamenhof – mallongigitan version de la granda biografio verkita de *Aleksander Korĵenkov* antaŭ du jaroj – kaj nove tradukitan libreton de *Tivadar Soros*, kiu unue aperis en la jaro 1923.

La konata fakulino *Esther Schor*, profesoro ĉe la Universitato Princeton, rekonis la ligan kun Zamenhof per sia prelego pri “Zamenhof kaj Estonteco”, en kiu ŝi ekzamenis la koncepton de la kreinto de Esperanto pri la estonteco de la homaro kaj la rolo de Esperanto en tiu kunteksto. La finan punkton en la periodo 1887-1923 traktis *Humphrey Tonkin*, la tradukinto de la verko de Soros, *Modernaj Robinzonoj*, kiu estis lanĉita en la simpozio. Tiu verko, nomata *Crusoes in Siberia* en sia angla versio, pritraktas la spertojn de la juna armea oficiro *Tivadar Soros* en militkaptitejo en Siberio dum la Unua Mondmilito, kaj lian postan eskapon. Eldonis ĝin la eldonejo Mondial, kun notoj kaj enkonduko de la tradukinto. *Tonkin* ankaŭ tradukis la libron de Soros pri la Dua Mondmilito, *Maskerado*. Li mem renkontis *Tivadar Soros* en kunveno en la aŭditorio de la UN-biblioteko en 1966, dum prelego de Ivo Lapenna. “Sed je tiu stadio mi ankoraŭ ne legis la libron”, li konfesis, nek li povis prognozi, ke la filo de *Tivadar* tiel famiĝos. Alikaze, li ŝerce sugestis, “la konversacio estus tute alia”.

La mezan parton de la simpozio okupis du programeroj. La historiisto *Ralph Dumain* ekzamenis la grandan gazetaran reagon okaze de la vizito de Zamenhof al la Universala Kongreso en Vaŝingtono en 1910, kaj la filmisto *Sam Green* montris malnetan version de sia dokumenta filmo pri Esperanto. *Sam Green* estas jam konata inter esperantistoj pro sia filmo *Utopio en Kvar Movimentoj*. La nova, 25-minuta, filmo rilatas ekskluzive al Esperanto kaj estas ĉefe produkto de la filmado, kiun *Green* faris en kelkaj lastatempaj Universalaj Kongresoj.

Sed la plej granda surprizo estis parolado, kiu ne troviĝis en la antaŭvidata simpozia programo, nome tiu de la konata financisto *George Soros*, kiu, kune kun pluraj stabanoj (kaj ankaŭ sia filo *Jonathan*), venis al la fina parto de la simpozio por kune festi la lanĉon de la anglalingva traduko de la libro de sia patro *Tivadar*. Soros, kiu ne estas en si mem subtenanto de Esperanto, sed kiu pasie emfazas la patran influon en la propra edukado, parolis dum deko da minutoj pri *Tivadar Soros* kaj ankaŭ pri la rolo, kiun Esperanto ludis en la propra vivo. Kiam li venis al Britujo en 1947, Soros tuj kontaktis la lokajn esperantistojn, kiuj multe helpis al li. Li ankaŭ memoras renkontiĝojn kun Esperanto-literaturistoj en la frua infanaĝo. *George Soros* kaj la frato *Paul* kontribuis antaŭparolojn al la nova eldono de la libro de la patro. Por la eldonejo, *Ulrich Becker* prezentis la libron al Soros; kaj *Tonkin* laŭtlegis parton de ĉapitro el *Maskerado* en la angla traduko. Fakte, la nova libro jam aperis antaŭ kelkaj monatoj, en itala traduko de *Margherita Denti*, sub titolo *Robinson in Siberia*. Ankaŭ tiu volumo enhavas la antaŭparolojn de la fratoj Soros kaj la enkondukon kaj notojn de *Tonkin*.

Sepdeko da homoj partoprenis la simpozion – esperantistoj, reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj, UN-oficistoj, diplomatoj, ĵurnalistoj kaj universitatanoj. Ankaŭ partoprenis skipo de studentaj televidistoj. Raportisto de *New York Times* poste publikigis favoran raporton en blogo de la ĵurnalo – kun foto de Soros ĉe la podio, akompanata de portreto de Zamenhof. Post la simpozio, ĵurnalista demandis al Soros ĉu frazoj de Esperanto ankoraŭ restas en lia memoro. Senhezite li citis:

“Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan.” Nu, jes ja!
(Laŭ <http://esperantic.org/eo/komunikado/novajxoj?n=33>).

1.2 Korekto pri la 33-a Esperantologia Konferenco en Havano

En Ipl 75, p.2, ni erare raportis, ke *Otto Prytz* el Norvegio prelegis pri “Fenditaj frazoj en Esperanto”. Tio estis eraro. Pro malsaniĝo Prytz ne povis partopreni la kongreson. Li prezentos sian prelegon kadre de la 34-a Esperantologia Konferenco, kiu okazos en 2011 en Kopenhago. Anstataŭ Otto Prytz prelegis *Humphrey Tonkin* pri “Organizaj strukturoj kaj la estonteco de Esperanto”.

1.3 La 20-a konferenco de GIL en Berlin

La 20-a konferenco de *Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL)*, kvazaŭ jubilea konferenco, okazis de 26.-28.11.2010 en Berlin. Partoprenis 40 Personoj el 10 landoj. La ĉeftemo estis „Lingvo-inventado kaj ĝiaj celoj“. La plej multaj de la 14 germanlingvaj prelegoj koncernis la ĉeftemon. Valoras mencii la prelegon de la prezidanto de GIL, *Detlev Blanke*, kiu bilancis la ĝisnunan agadon de la organizaĵo, kiu estas senŝanĝe stabila kaj aktiva, kaj menciis kelkajn problemojn por la estonteco. Post 20-jara gvidado Blanke ne rekandidatiĝos por la posteno de la prezidanto. Antaŭvideble la pozitiva agado de GIL tamen daŭros.

2 Estontaj aranĝoj

2.1 34-a Esperantologia Konferenco kadre de la UK en Kopenhago

Ankaŭ ĉi-jare okazos la tradicia esperantologia konferenco kadre de la UK-o. Kiel konate la 34-a Universala Kongreso okazos de 23-a ĝis 30-a de julio 2011 en Kopenhago. I. a. estas antaŭviditaj prelegoj pri la gravaj danaj lingvistoj *Rasmus Christian Rask* kaj *Otto Jespersen* krome pri la dana esperantologo *Paul Neergaard*.

2.2 Interlingvistika konferenco en Tartu omaĝe al *Aleksandr Duliĉenko*

En oktobro 2011 en Tartu/Estonio okazos lingvosciencia konferenco kun la du sekcioj slavistiko kaj interlingvistiko. La konferencon oni aranĝos omaĝe al la 70-jariĝo de *Aleksandr Duliĉenko*, aŭtoro de la gravega libro “Internaciaj helplingvoj” (*Meždunarodnye vspomogatel'nye jazyki*, Tallin: Valgus, 1990). Li estas emerita profesoro de la Tartua Universitato kaj honora doktoro de la Universitato de Trier (Germanio). Li prelegadas nun ofte en eŭropaj universitatoj pri slavistiko kaj verkas fundamentajn librojn pri tiuj temoj. La kontribuoj al la konferenco aperos en la universitata serio *Interlinguistica Tartuensis X*, 2011. Kiel dum antaŭaj konferencoj, alveno de raportontoj al Tartu estas libervola, pli gravas la verkoj mem.

Informojn donas:

Madis Linnamägi

Estona Interlingvistika Asocio

Pepleri 27, EE-51010 Tartu

GSM +372 509 8647

madis@forselius.ee

2.3 Konferenco okaze de la 400-a naskiĝtago de *Thomas Urquhart*

Ĝi okazos la 15-an kaj 16-an de aprilo 2011. Kiel konate Urquhart estis tre multflanka kaj i.a. okupiĝis pri la problemoj de Universala Lingvo.

Informojn oni trovas ĉe: www.urquhartconference.org.uk

Pri Urquhart kaj la konferenco oni legas en la pria teksto:

A Celebration of the Life and Times of the 17th century laird of Cromarty, civil war soldier, writer and translator of Rabelais. A two-day conference is scarcely long enough to cover all aspects of the extraordinary career of Sir Thomas Urquhart. An Episcopalian Laird in a Presbyterian community in continual dispute with the local clergy; a Royalist soldier whose military exploits began at the Trot of Turriff and ended at the Battle of Worcester; the would-be inventor of a Universal Language; a writer of unsurpassed verbosity who traced his ancestry back to Adam and Eve; Urquhart was also the finest ever translator of the works of Rabelais. Cromarty Arts Trust, in partnership with colleagues at the prospective University of the Highlands and Islands (UHI), will celebrate the 400th anniversary of the birth of Sir Thomas Urquhart of Cromarty with an academic conference in April 2011.

2.4 La 21-a konferenco de GIL en Berlin

Dum la 20-a jaro de sia ekzisto la germana scienca Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik e.V., GIL) okazigos sian 21-an konferencon, denove en Berlin. Ĝi okazos de la 18-a ĝis 20-a de novembro 2011. La ĉeftemo ĉi-foje estos “Faka komunikado – interlingvistikaj aspektoj”. Kiel kutime la konferenclingvo estas la germana. Rajtas partopreni, ankaŭ kun prelegoj, ne nur membroj de GIL. Ĉiujn necesajn informojn oni trovas ĉe <http://www.interlinguistik-gil.de/einladg.html>, aŭ ricevos de detlev@blanke-info.de.

3 Faklingva komunikado

3.1 Novaj faklingvaj libroj

Cherpillod, André (2009): *Medicina Leksikono. Esperanto-franca kaj Franca-Esperanta*. Courgenard: La Blanchetière, 99 p., ISBN 2-906134-82-1.

Pluhař, Zdeněk (2009): *Chemický slovník esperantsko-český a česko-esperantský. Ĥemia Vortaro Esperanta-Ĉeĥa kaj Ĉeĥa-Esperanta*. Dobřichovice: KAVA-PECH, 201 p. ISBN 978-80-87169-10-0.

Ullrich, Ingward (2009): *Nomenclatura florae lignae silvestris europae. Nomenklaturu de la forsta ligneca flaŭro de Eŭropo. Nomenklatur der forstlichen Gehölzflora Europas. Nomenclature of forest ligneous flora of Europe. Nomenclature de la flore ligneuse forestière d'Europe*. Eberswalde: Förderverein “Lexicon silvestre” e.V., 225 p. ISBN 978-3-931262-67-9.

3.2 Charles Darwin kaj Noam Chomsky en Esperanto

Ankaŭ estas interese esplori, kiel la tradukintoj solvis terminologiajn problemojn en la du laste aperintaj libroj, kiuj aperis en la serio “Scienca Penso”, de UEA nove starigita (laŭ impulso de la iama estarano José Antonio Vergara el Ĉilio)

3.2.1 Charles Darwin

Okaze de la Darwin-jaro 2009 en Esperanta traduko aperis la certe plej fama verko de Charles Robert Darwin (1809-1882) pri la specioj. La anga eldono „The Origin of Species” unuan fojon aperis en 1859 (London: John Murray).

Bedaŭrinde la neeltenebla malsano kripligi proprajn nomojn, kiu sen rimarkebla kontraŭstaro fortas en Esperantujo, ne indulgis tiun faman verkon. Kaj la tradukinto ne donis sian originalan nomon. Kiel oni bibliografiu tiajn verkojn?

Klare, ke ekster la esperanta mondo la kripligado de propraj personaj nomoj estas rigardata kiel pruvo de primitiva sektismo. Feliĉe en la libro oni ekscias la verajn nomojn enkrampe, tamen...

Jen la titolo (cetere foje Karolo Darvino [interna titolo], foje Karolo Darvin [ekstera titolo]):

Karolo Darvino (2009): *La Origino de Specioj*. Esperantigis el la angla Klivo Lendon (Serio „Scienca Penso“ N-ro 1), Antwerpen: Flandra Esperanto-Asocio, 431 p., ISBN 978 90 770 66 40 9.

3.2.2 Noam Chomsky

Avram Noam Chomsky (1928-), la mondfama lingvisto, foje estas epitetita “la Einstein de la lingvoscienco”. Verŝajne tia epiteto estas dubinda, ĉar krom la ekzisto de multaj disĉiploj de la lingvisto ne mankas kritikantoj de liaj teorioj. Krome, por multaj politike engaĝitaj homoj liaj politikaj analizoj estas eĉ pli gravaj. Tamen, estas nedubeble, ke liaj lingvistikaj teorioj havis kaj – en malgraviĝanta grado – ankoraŭ havas grandan influon al la nuntempa lingvoscienco. Liaj verkoj krome havis influon i.a. al informadiko, komputa lingvistiko kaj psikologio. Pro tio la traduko de la sekva libro estas tre bonvena:

Noam Chomsky (2010): *Lingvo kaj Menso*. Tradukita de Edmund Grimley Evans (Serio “Scienca Penso” N-ro 2), 188 p. (angla originala titolo “Language and Mind. Third Edition”, Cambridge: Cambridge University Press 2006). ISBN 978-92-9017-114-0.

La tradukita verko, krom la prefacoj de Chomsky al la eldonoj 1-a ĝis 3-a, ankaŭ entenas du gravajn enkondukojn:

La internacia lingvo kaj universala gramatiko de la barata lingvisto *Probal Dasgupta*.
Evoluo de la ĉefaj tezoj de Chomsky de la japana psikolingvisto *NAGATA Hiroshi*.

3.3 Lexicon silvestre – eseoj de Karl-Hermann Simon pri la multlingva forstfaka vortaro

3.3.1 La libro

Okaze de la 80-a naskiĝtago (30.9.2010) de la konata forstfakulo kaj leksikografo el la nordgermana urbo Eberswalde, *d-ro Karl-Hermann Simon*, aperis libro kun la ĉefaj studoj de Simon pri la metodologio aplikita (kaj aplikata) dum la ellaborado de la forstfaka vortaro *Lexicon silvestre* (latine: vortaro de forsto).

La libron iniciatis, kompilis kaj redaktis *Stefan Panka* kaj *Detlev Blanke*. La antologio estas dulingva (en la germana kaj en Esperanto). Ĝi entenas sep eseojn en la germana kaj sep en Esperanto. Laŭenhave ambaŭ partoj pli malpli identas.

Jen la titolo:

Simon, Karl-Hermann (2010): *Lexicon silvestre. Beiträge zum multilingualen Wörterbuch des Forstwesens. Kontribuoj pri la multlingva vortaro de la forstfako*. Herausgegeben von/Redaktita de Detlev Blanke & Stefan Panka. Mit einem Vorwort von/kun antaŭparolo de Klaus Schubert. Eberswalde: Förderverein „Lexicon silvestre“ e.V., 183 p.,

ISBN 978-3-931262-68-6 (i.a. kun listo de publikaĵoj de Karl-Hermann Simon).

3.3.2 Enkonduko

Sekvas la reprodukto de la enkonduko al la libro, kiu informas pri la libro kaj la jubileulo:

La prezentata libro informas pri unika leksikografia entrepreno, kiu estis iniciatita en 1981 de kelkaj forstsciencistoj el la Instituto pri Forstsciencoj en Eberswalde; trovinte larĝan internacian eĥon dum mallonga tempo ĝi evoluis al internacia projekto.

La multlingva forstfaka vortaro, pro lingva neŭtraleco konatiĝinta sub la latina nomo *Lexicon silvestre*, estas unika pro tio, ĉar ĝi estas ellaborita surbaze de la internacie rekonataj terminologiaj principoj, fiksitaj en normoj de ISO. Laŭ tiuj normoj elirpunkto de la fakleksikologia laboro estas ne la termino (la nomo, la fakvorto), sed la nocio. La nomado de la nocioj per normterminoj okazas ĉe la fino de kompleksa laborprocezo, al kiu apartenas la paŝoj limigo de la fako, laŭkategoria listigo de la nocioj, fiksado de la nocisistemoj kaj difino de la nocioj.

La prezentataj eseoj konigas la kolektitajn praktikajn kaj teoriajn spertojn kaj la terminografiajn metodojn, kiuj tute ne estas komuna scio de leksikografoj. Ili estas novaj por la forstfaka leksikografio. Tial la eseoj en ĉi-tiu volumo ne nur povas sugesti por plua vortara laboro sur la kampo de la forstfako, sed tute ĝenerale prezentas interesajn por la terminologia kaj terminografia kreado, do ankaŭ por aliaj fakoj.

Kreskanta nombro da forstfakuloj el diversaj landoj kontribuis al tio, ke dum la lastaj du jardekoj la *Patrona Asocio "Lexicon silvestre" r.a.* en Eberswalde povis prezenti po1-9 volumojn kun po mil terminoj por entute 15 unuopaj lingvoj, depende de la prilaborantoj por la lingvoj. Tio sumiĝas al 46 diversaj volumoj, el kiuj pluraj atingis kelkajn eldonojn. Germana eldono kun la deka milo nun estas preparata. Proveldono el la jaro 1992 eĉ entenis terminojn kun difinoj en 26 lingvoj.

Tia rezulto nur eblis pro bone organizita kaj kontinua laboro de teamo. En la unuopaj lingvaj eldonoj oni pro tio trovas nomojn de pli ol 70 personoj, kiuj diversmaniere kunlaboris por la vortaro.

La ĉefa motoro de la tuta entrepreno estas la forstsciencisto kaj leksikografo el Eberswalde, *d-ro Karl-Hermann Simon*, al kiu okaze de lia 80-a naskiĝtago (30.09.2010) estas dediĉita ĉi tiu libro.

D-ro rer. silv. Karl-Hermann Simon naskiĝis la 30-an de septembro 1930 en Erfurt. Post la abiturienta ekzameno li studis de 1949 ĝis 1953 ĉe la Forstscienca Fakultato de Humboldt-Universitato de Berlino en Eberswalde kaj finis la studon kiel diplomita forstinĝeniero. En la jaro 1959 sekvis doktoriĝo pri artefarita grundokovraĵo en pino-plantaĵoj kun aparta konsidero de la mikroklimato.

De 1953 ĝis 1991 li unue laboris en la Instituto por Meteorologio de la Forstscienca Fakultato Eberswalde, poste en la Sekcio Arbara Ekologio/Hidrologio de la Instituto por Forstsciencoj, resp. Esplora Instituto por Mastrumado de Forsto kaj Ligno en Eberswalde. Sian karieron Simon komencis kiel scienca aspiranto. Ekde 1962 li laboris kiel scienca kunlaboranto kaj ekde 1987 kiel fakestro por forsta hidrologio kaj vicsekciestro. Komence lia esplorado koncernis precipe forstmeteorologiajn aspektojn kaj problemojn de la enplantara klimato. Komence de la 70-aj jaroj li pliokupiĝis pri la kampo de forsthidrologio. Sub la gvido de d-ro Simon en Britz, ĉe Eberswalde, konstruiĝis granda instalaĵo de lizimetro, siatempe la plej granda en Eŭropo.

En 1978 d-ro Simon fariĝis membro de la Esperanto-organizaĵo de GDR. En 1981 li fondis la "Internacian Forstistan Rondon Esperantlingvan" (Grupo de forstistoj parolantaj Esperanton), kiu celis la scian ellaboradon de forstfaka terminologio en Esperanto. La revueto "Forstista

Informilo”, fondita en 1982 de d-ro Simon kaj aperigita ĝis 2008 sub lia redakto, estas seninterrompe la baza komunikilo por ĉiuj agantoj kaj interesatoj pri forsta terminologio. Post la germana unuiĝo laŭ lia iniciato fondiĝis la “Patrona Asocio ‘Lexicon silvestre’ r.a.”, kiu ekde tiam respondecas pri la preparado kaj eldonado de la leksikono de la forstfaka terminologio “Lexicon silvestre”.

Preskaŭ ĉiuj publikigitaj eseoj baziĝas sur prelegoj, kiujn Karl-Hermann Simon inter 1990 kaj 2003 prezentis en la germana lingvo aŭ en Esperanto. Ni signas tiujn kolegojn de la jubileulo kiel kunaŭtorojn, kiuj kunlaboris ĉe la preparo de la prelegoj kaj publikigitaj tekstoj. Tiel ekzemple al la teksto I kontribuis *Elsbeth Pluquet*. *Ingward Ullrich* kunlaboris por la tekstoj I, III, IV, V, VII, IX, X, XI, XII kaj XIII. *Horst Weckwerth* kunaŭtoris la tekstojn VI, VII, IX, X, XI, XIII kaj XIV. *Klaus-Peter Weidner* helpis la kontribuojn VI kaj XIV. La bulgara forstingenerio *Boris Dimitrov Marinov* estis kunaŭtoro de la tekstoj V, VII kaj VIII.

Aparte klare montriĝas la faka engaĝiĝo de Ingward Ullrich kaj Horst Weckwerth. *Ingward Ulrich* i.a. liveris nemalhaveblan kontribuon al la vortaro per la traduko kaj prilaboro de la nomenklaturado de la forsta ligneca flaŭro de Eŭropo kaj per studoj pri la vortfarado, kion ankaŭ montras la bibliografio (vidu p. 124/125).

La eseoj aperis en diversaj revuoj kaj konferencaktoj kaj ĉi tie estas represataj kun afabla permeso de la koncernaj eldonejoj kaj redakcioj. Ni supozas, ke ni trovis la plej gravajn tekstojn.

La libro estas dulingva, kun 7 kontribuoj en la germana kaj 7 en Esperanto.

Kial en Esperanto? La internacia planlingvo, iniciatita en 1887 de *Ludwik Lejzer Zamenhof* (1859-1917), dum pli ol 120 jaroj ne nur evoluis al esprimforta komunikilo, sed same pruvis sian specifan taŭgecon kiel lingvo de internacia faka komunikado. Tion diversloke substrekas ankaŭ Karl-Hermann Simon kaj liaj kunaŭtoroj. Ĉi-rilate menciendas, ke la fondinto de la terminologio-scienco, scienco kiu, sendepende de lingvo kaj fako, disponigas terminologiajn principojn en la formo de ISO-normoj, estis la aŭstra interlingvisto kaj esperantologo *Eugen Wüster* (1898-1977), sekvita de sia latva-sovetia kolego *Ernest K. Drezen* (1892-1937), kiu same estis interlingvisto kaj esperantologo. Ambaŭ terminologoj, kaj en ilia tradicio ankaŭ aliaj fakuloj pri la terminologio-normigado, el la okupiĝo kun Esperanto ĉerpis esencajn impulsojn por ilia prinormiga laborado. Tial oni povas vere aserti, ke Lexicon silvestre ne ekzistus en la konata formo sen Esperanto. La aparta rolo de la planlingvo en la eseoj kelkfoje estas priskribita kaj pruvita per ekzemploj.

La libro sekve direktiĝas al germanaj legantoj kaj al multlingva publiko. Tial eblas larĝa internacia akcepto. Resumoj en Esperanto kaj la germana faciligas la komprenon de la tekstoj. Ĉar la angla aktuale estas la tutmonde gvida internacia lingvo, ni ankaŭ tradukigis la resumojn anglan.

La leganto rimarkos, ke jen kaj jen en la tekstoj ripetiĝos iuj informoj kaj vidpunktoj. Ni opinias, ke tio ne estas malavantaĝo, ĉar ĉiu teksto entenas novajn akcentojn, perspektivojn aŭ ekzemplojn. Aldoniĝas, ke pro la malsamtempa estiĝo de la eseoj ĉiam denove povis esti konsiderataj novaj spertoj. Tiuvidpunkte la ripetoj eĉ havas didaktikan funkcion.

La redaktoroj klopodis ordigi la tekstojn laŭenhave kaj, kie oportune kaj necese, bibliografie aktualigis ilin. Krom tio ili aldonis iom signifan kvanton da notoj (signitaj per R), liston de mallongigoj kaj komunan liston de literaturo. Ankaŭ aldoniĝis kunmeto de la publikaĵoj kaj aliaj sciencaj laborrezultoj de Karl-Hermann Simon.

En la germanaj tekstoj estis faritaj nur etaj stilaj kaj ortografiaj korektoj, kiuj i.a. rezultis el la ortografia reformo (aparte ß/ss).

Ĉi-loke iru aparta danko al kelkaj personoj pro la subteno al la libro: al *Ingeborg Simon* pro la jardekojn longa komprenema subteno al sia edzo kaj al la vortara projekto, al *Wera Blanke* pro la kontrollegado de la tekstoj, al *Clivia Panka* pro la angligo de la resumoj kaj al *Peter Spangenberg* pro la preso. La libro ankaŭ estu esprimo de la aprezo por la multaj kunlaborantoj, kiuj ĉi-tie ne unuope mencioblas.

La publikigon dankinde subtenis la usona fondaĵo *Esperantic Studies Foundation* (ESF).

Fine ni esperas, ke de Lexicon silvestre eliru gravaj impulsoj por la plua terminologia laboro en la forstfako kaj ankaŭ ekster ĝi en aliaj fakoj.

En aprilo 2010

Detlev Blanke, Berlin
Societo pri Interlingvistiko r.a.
Prezidanto

Stefan Panka, Britz (ĉe Eberswalde)
Patrona Asocio "Lexicon silvestre" r.a.
Prezidanto

4 Personoj kaj iliaj verkoj

4.1 KURISU Kei

Ulrich Lins

4.1.1 Homo kaj vivo

KURISU Kei naskiĝis la 18-an de julio 1910 en la japana gubernio Wakayama. La patro, medicinisto, mortigis sin antaŭ lia naskiĝo. Li lernis Esperanton en 1930, ĉar li opiniis, ke per tiu lingvo eblos progresigi komunismon, je kiu li kredis. Li aktivis en Japana Proleta Esperantista Unio kaj kunredaktis la kulturajn revuojn *Marŝu* kaj *Majo* (1935/36). Pro sia politika agado li pasigis entute kvar jarojn en malliberejo.

Li frue uzis Esperanton por akiri kaj mem disvastigi la scion pri eŭropaj literaturoj, malpli konataj en Japanio. Komence ĝi servis kiel pontolingvo (por la japana traduko de *Muta barikado* de Jan Drda, 1952). El la angla li tradukis *Riporto skribita en la pendumila maŝo* de Julius Fučík, 1952. En la komenco de la kvindekaj jaroj li decidis aŭtodidakte lerni la ĉeĥan kaj slovakajn lingvojn por povi rekte traduki el ili en la japanan. En 1956 aperis lia japana traduko de *Avineto* de Božena Němcová. En 1960 sekvis tradukoj de *Rakontoj el unu poŝo* de Karel Čapek kaj de *La bapto de caro Vladimir* de Karel Havlíček-Borovský. Krome li tradukis verkojn de Jan Neruda, S. K. Neumann, Jiří Wolker kaj Jaroslav Seifert. Tiel Kurisu en sia lando akiris renomon kiel specialisto pri Ĉeĥoslovakio. De 1959 ĝis 1961 li restadis en Prago kiel universitata lektoro pri la japana lingvo. Post sia reveno al Japanio li komencis traduki *La brava soldato Ŝvejk* de Jaroslav Hašek, kiu aperis ĉe prestiĝa eldonejo en Tokio (1962/63). En 1970 aperis traduko de *Milito kontraŭ salamandroj* de Karel Čapek. Sekvis tradukoj de verkoj de Jiří Weil kaj Arnošt Lustig (1967) kaj dramoj de Karel Čapek: *R.U.R.* (1978) kaj *Blanka malsano* (1992). El la slovakaj li tradukis verkojn de Ladislav Mňačko.

En Esperanton li tradukis la romanon *Krabŝipo* de Kobayashi Takiji. Ĝi ne estis eldonita, sed surbaze de tiu esperantigo en 1951 aperis slovakaj traduko (de Imrich Zálupský).

Antaŭ kaj precipe post la milito Kurisu uzis Esperanton por ampleksa korespondado kun eŭropaj kaj ĉinaj esperantistoj. Laŭ lia klarigo, la lingvo utilis al li por frue kompreni ankaŭ la malakordon de teorio kaj realo en komunismo. En 1951 li ekŝiĝis el Komunista Partio de Japanio. Precipe en la finaj jardekoj de sia vivo li multe verkis por japanaj periodaĵoj pri

aktualaj problemoj de orienta Eŭropo. Al taggazetoj (*Asahi*, *Mainichi*, *Yomiuri* k.a.) li kontribuis ankaŭ eseojn pri Zamenhof, Ivo Lapenna kaj William Auld.

Kurisu tradukis japanen ankaŭ rekte el Esperanto: *La danĝera lingvo* de Ulrich Lins (1975) kaj *Tempesto super Akonkagvo* de Tibor Sekelj (kun sia filo Akane, 1990). En 1979 li iniciatis la fondon de Societo por Japano-Ĉina Amikeco per Korespondado, kiun li mem prezidis. Al japanaj kulturaj periodaĵoj li regule kontribuis diverse, laste ankaŭ pri sia vivo, en kiu tiom rolis la Esperanta korespondado. En 1991 li iĝis Honora Membro de UEA. 85-jara li debutis kiel Esperanto-verkisto, gajnante per eseo en la Belartaj Konkursoj de UEA la Premion Luigi Minnaja. Dum la 92-a UK en Jokohamo (2007) li kaptis la atenton de ĉiuj kongresanoj per vigla parolado, en kiu li alvokis, ke la esperantistoj pli forte subtenu la Esperantan literaturon (publikigita en la libro *Kajto de Esperanto*, 2010, p. 344-345). Li mortis la 18-an de aprilo 2009.

Kurisu planis aperi detalan aŭtobiografion. Siajn “radikojn” li komencis priskribi en la monata literatura revuo *Hoppô Bungei* (1983-1985); li ĉesis post la 27-a daŭrigo. En la kvaronjara revuo *Hitori kara* (Ekde unu homo) en marto 2005 ekaperis alia serio de memoroj, ĉefe pri tio, kion Esperanto donis al li; la lasta kontribuado aperis en n-ro 38 (junio 2008).

4.1.2 Verkoj de Kurisu Kei

La **sekvaj bibliografioj** estas preskaŭ la kompleta listo de la verkoj de Kurisu:

(a) Shibata Iwao, “Kurisu Kei shûyô chosaku mokuroku / A Main Bibliography of the Works by Kei KURISU”. *Chiba Kôgyô Daigaku kenkyû hôkoku. Jinbun hen / Report of C.I.T.* [Chiba Institute of Technology], 2003, n-ro 40, p. 161-182.

(b) Listo de la tradukoj de Kurisu el la ĉeĥa literaturo estas en *Bulteno de Esperantista Klubo en Praha*, 2004, n-ro 3 (172).

La **plej gravaj Esperantaj artikoloj** (ĉi-sube markitaj per *) estas nun kunigitaj en la libro:

Kurisu Kei, *Kajto de Esperanto*. Kompilis Shi Chengtai. Huhehot: Esp-Asocio de Interna Mongolio 2010, 367p.

Elekto de la ĉefaj verkoj

“Evitu naciismojn en esperanto”. *La Nova Etapo* (Moskvo), 1932, n-ro 2, p. 88.

“Esuperanto bungaku o megutte [Ĉirkaŭ la Esperanta literaturo]”. *Marŝu* (Kôbe), 1935, n-ro 2 (marto), p. 23-25.

“El Japanio” [letero]. *Internacia Kulturo*, vol. 3, 1948, n-ro 10, p. 21.

(Kompilo) *Onaji taiyô ga sekai o terashite iru / La sama suno lumigas la mondon. Kolekto de leteroj antaŭ- kaj postmilitaj de eksterlandaj samideanoj ... en japana traduko*. Kyôto: Kitaôji shobô 1949. 316p.

(Kompilo) *Sekai no koe. Sekai no jinmin kara Nihon no jinmin e / Voĉo de l' mondo. Kolekto de leteroj de 18-landaj samideanoj pri Japanio kaj iliaj landoj*. Kyôto: San'ichi shobô 1949. 179p.

(Kunredakto) *Sekai kaihô shishû / Monda liberiga poemaro*. Tôkyô: Iizuka shoten 1951. 296p.

“Kei Kurisu en Praha”. *Oomoto*, vol. 28, 1966, n-ro 317/318, p. 183-184. – Intervjuo aperinta en *Večerní Praha*, 1966, n-ro 157; trad. Jana Cichová.

“EKRELO”. *La Revuo Orienta*, vol. 54, 1973, n-roj 3-5,7,8,11,12; vol. 55, 1974, n-roj 2,6-8,10-12; vol. 56, 1975, n-roj 1 kaj 2.

“‘La danĝera lingvo’ o yonde omotta koto. Shohyô ni kaete [Pensoj dum la legado de *La danĝera lingvo*. Anstataŭ recenzo]”, *Nova Rondo* (Tokio), 1973, n-ro 25, p. 27-49.

* “Esence diferenca de la cetera mondo”. *Esperanto*, vol. 67, 1974, n-ro 1 (817), p. 6-9 [pri la ĉina Esperanto-movado].

“Shakaishugi to kokusaigo no mondai ni tsuite no ichi kôsatsu [Unu konsidero pri la problemo de socialismo kaj internacia lingvo]”. *Gendai shisô*, vol. 4, 1976, n-ro 2, p. 129-139; n-ro 3, p. 191-209.

“Esperanto estas beninda lingvo” *La Revuo Orienta*, vol. 57, 1976, n-ro 5, p.14-15 [okaze de la japana traduko de *La danĝera lingvo*].

“Jijitsu e no hitori tabi [Sol-vojaĝo al la vero]”. *Hoppô Bungei* (Sapporo), 1983, n-ro 1 (180)-11 (190); 1984, n-ro 1 (192), ĝis 1985, n-ro 4 (207).

* “Defendo de la ‘Fundamento de Esperanto’”. *Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj*, 1987, n-ro 6/7 (januaro), p. 86-88.

Letero al Nikola Aleksiev (1993). Eltiraĵo en: Nikola Aleksiev, *Per Esperanto – por aŭtentika informado*. Red. Detlev Blanke. Berlin 1998, p. 66-71.

“Nikora Arekishiefu no tenbô [La transformiĝo de Nikola Aleksiev]”. *Nova Rondo* (Tokio), 1993, n-ro 35, p. 38-50.

* “Kiel mi memoras Ĵelezon”. *Esperanto*, vol. 87, 1994, n-ro 5 (1059), p. 88-89 [pri Ye Laishi (1911-1994)].

* “Kiel Esperanto helpis al mi solvi enigmojn de ‘Riporto’”. *Fonto*, vol. 15, 1995, n-ro 177, p. 19-30.

* “Ankoraŭfoje pri ‘Riporto’ kaj ĝia aŭtoro”. *Sennacieca Revuo*, 1996, n-ro 124, p. 19-25.

“Sed tamen vivas Esperanto”. *Fonto*, vol. 16, 1996, n-ro 185, p. 5-15.

Co mi dala česká literatura [Kion donis al mi la ĉeĥa literaturo]. Trad. Jaroslav Žák. Dobřichovice: KAVA-PECH 1996. 32p. – Esperanta originalo: * “Kion al mi donis la ĉeĥa literaturo”. *La Verda Kolombo*, 1997, n-roj 1-6.

* “Por demokratio, kontraŭ monarkio”. *La Gazeto*, vol. 12, 1997, n-ro 72, p. 28-29.

* “El miaj rememoroj...”. *Laŭte!*, 1997, n-ro 130, p. 11-19; n-ro 131, p. 29-34.

* “Kiel Esperanto helpis al mi liberiĝi de komunismaj dogmoj”. *Sennacieca Revuo*, 1997/98, n-ro 125/126, p. 1-7.

* “Kial kaj kiel mi fariĝis esperantisto”. *Fonto*, vol. 18, 1998, n-ro 205, p. 24-31.

“Debuti”. *Monato*, vol. 19, 1998, n-ro 4, p. 24-26.

* “Mi serĉas korespondantojn el Francio”. *Laŭte!*, 1998, n-ro 137, p. 39-44.

* “La tragedio de Verda Majo”. *Riveroj* (Ôsaka), 1999, n-ro 23, p. 20-31.

* “La kajto de Esperanto”. *Laŭte!*, 1999, n-ro 144, p. 15-22.

* “Kiel Esperanto servis la komunistan movadon en antaŭmilita Japanio”. *Sennacieca Revuo*, 1999, n-ro 127, p. 1-7.

- “Japana PEN kaj nia lingvo”. *Literatura Foiro*, vol. 31, 2000, n-ro 183, p. 20.
- “De idealo al realo”. *La Gazeto*, vol. 15, 2000, n-ro 3 (87), p. 9-15.
- “Majstra traduko de majstra romano”. *El Popola Ĉinio*, 2000, n-ro 9, p. 46 [pri *La familio de Bakin*].
- * “Idealo kaj realo de la Esperanta literaturo”. *Fonto*, vol. 20, 2000, n-ro 233, p. 17-29.
- * “Pri ‘Kiel mi lernis’ de Maksim Gorkij”. *Laŭte!*, 2001, n-ro 155, p. 34-44.
- * “Historio pri Krabŝipo”. *Sennacieca Revuo*, 2001, n-ro 128/129, p. 4-12 [pri la romano de Kobayashi Takiji].
- * “Kion donis al mi lastatempa legado”. *La KancerKliniko*, 2001, n-ro 100, p. 11-12.
- * „Ankoraŭfoje pri ‚Kiel mi lernis““. *Laŭte!*, 2002, n-ro 157, p. 41-50.
- „Leterego“. *La KancerKliniko*, 2002, n-ro 101, p. 12-13.
- * „Penslibereco en Ĉinio“. *Monato*, vol. 23, 2002, n-ro 2, p. 6.
- “Antaŭ sesdek jaroj”. *Fonto*, vol. 22, 2002, n-ro 256, p. 9-21.
- * “Memorinda esperantisto: Nakagaki Kozirô (1894-1971)”. *La Gazeto*, vol. 17, 2002, n-ro 101, p. 7-10.
- * “Provŝtono”. *Sennaciulo*, vol. 72, 2002, n-ro 7/8 (1165/1166), p. 108-109.
- * “El la vivo de japana oldulo”. *Laŭte!*, 2002, n-ro 161, p. 28-31.
- * “Sporade ĉirkaŭ SAT”. *Sennacieca Revuo*, 2002/03, n-ro 130/131, p. 4-11.
- * “De ‘kamarado’ al ‘ambasadoro’”. En: Irimi kaj Reinhard Haupenthal (ed.), *Klaro kaj elasto. Fest-libro por la 80a naskiĝ-tago de Fernando de Diego*. Schliengen: Iltis 2003, p. 51-60.
- * “Julius Fučík”. *La KancerKliniko*, 2003, n-ro 106, p. 20-21.
- “Leter(eg)o”. *La KancerKliniko*, 2003, n-ro 107, p. 24-25.
- * “Vendi hundan viandon sub masko de ŝafa kapo“. *Laŭte!*, 2003, n-ro 165, p. 4-8.
- (Traduko) Nakano Yosiko, “Buda’ en Sarajevo”. *La Gazeto*, vol. 19, 2004, n-ro 112, p. 32-33.
- “Mi opinias, ke la Tennoo respondecas pri la milito”. *Sennacieca Revuo*, 2005, n-ro 133, p. 28-39.
- „Nihonjin e no yuigon“ [Testamento al la japanoj]. *Hitori kara*, 2005-2008, n-roj 25-38.
- „Infero“. *La Gazeto*, vol. 21, 2006, n-ro 122, p. 14-17.
- * „Bela songo“. *La KancerKliniko*, 2007, n-ro 123, p. 19-20.
- “Dank’ al malriĉo kaj malsano”. En: Hori Jasuo (red.), *Esperanto kaj mi. Eseoj de 180 esperantistoj el aziaj landoj*. Maebaŝi: Horizonte 2007, p. 55-56.
- “Kial mi ankoraŭ restas esperantisto” (2004). *Sennacieca Revuo*, 2009, n-ro 137, p. 34-44. – Ankaŭ ĉe: <http://members.jcom.home.ne.jp/verda/ser%20esperanta%20versio.htm>. Fragmente en: *Bulteno de Esperantista Klubo en Praha*, 2010, n-ro 1 (188), p. 2-4. Ĉeĥa traduko de la

plena teksto (trad. Jiří Patera) en: *Bulteno de Esperantista Klubo en Praha*, 2004, n-ro 3 (172), p. 1-11.

Periodaĵoj (kiujn Kurisu redaktis/eldonis)

- *Informilo de Esperanto-Koresponda Studrondo*, 1955, n-roj 1-3.
- *Nia Korespondo. Organo de Esperanto-Koresponda Studrondo*, 1955, n-ro 4, ĝis 1956, n-ro 6.
- *Pacifika Lumturo*, 1976/77, n-roj 1-3.
- *Esperanto no sekai / La Mondo de Esperanto*, 1979, n-ro 5, ĝis 1980, n-ro 10.

Pri Kurisu

„Kurisui Kei”. *Tempo* (Zagreb), vol. 22, 2003, n-ro 2 (dec.), p. 7 [aŭtobiografia skizo].

Jakvo [Schram], „Irassyaimase! (japane: bonvenon!) aŭ Tinĉjo en Japanio (n^o 8)”. *Sennaciulo*, vol. 75, 2005, n-ro 9 (1203), p. 120-121.

* Shi Chengtai, „Li flugigis kajton ĉielen”. *La Gazeto*, vol. 21, 2006, n-ro 5 (125), p. 23-29.

---, „Ĉiam brilanta stelo en mia koro”. *La Gazeto*, vol. 24, 2009, n-ro 5 (143), p. 7-8.

4.2 Renato Corsetti – okaze de lia 70-jariĝo

Ekzistas multaj kialoj por tre kore gratuli al *Renato Corsetti* okaze de lia 70-a naskiĝtago, fine de marto 2011. Li ne nur estas multflanka esperantista aganto, sed ankaŭ – kio verŝajne ne estas tro konata – profesinivela interlingvisto kaj psikolingvisto, kiu atingis la pozicion de universitata profesoro. Li senlace daŭre stimulas, kuraĝigas, helpas kaj influas multajn aktivulojn por Esperanto kaj por lingvo-politiko. Pro tio IPI estas la ĝusta loko almenaŭ por iom omaĝi la jubileulon kaj iom pli konatigi la konaton...

4.2.1 Biografio

Renato Corsetti naskiĝas en Romo, la 29-an de marto 1941. Li aktivas en la Esperanto-movado ekde la fino de la 60-aj jaroj de la pasinta jarcento. Dum la unua parto de sia vivo li laboris en banko kaj poste en la Universitato de Romo.

Li havis jenajn ĉefajn postenojn en la Esperanto-movado:

- Prezidanto de TEJO 1971-1973
- De la jaro 2000 ĝis la jaro 2006 estrarano de UEA, vicprezidanto de 1998 ĝis 2001 kaj prezidanto de 2001 ĝis 2007.
- Ekde 1999 sekretario de la Akademio de Esperanto.
- Estrarano kaj prezidanto de Itala Esperanto-Federacio dum pluraj periodoj.

Scienca agado:

Post la unua doktoriĝo en 1964 pri Ekonomio en la Universitato de Romo, “La Sapienza”, per disertacio pri internacia ekonomio, kaj post kromaj studoj en la Universitato de Torino pri organizado, ekde la jaro 1974 li okupiĝis pri lingvaj studoj, kaj aparte pri soci-lingvistiko, lingvo-planado kaj lingvo-politiko kunlabore kun *Profesoro Giorgio Cardona*, de la katedro por lingvistiko, en la fakultato de Humanismaj Studoj (Lettere e Filosofia) de la universitato de Romo, “La Sapienza”.

Ekde la jaro 1980 li faris esplorojn pri infana dulingveco kunlabore kun *profesorino Traute Taeschner* de la Fakultato pri Psikologio de la sama universitato. Ekde la jaro 1993 li ankaŭ okupiĝas pri instruado de fremdaj lingvoj..

De la universitata jaro 1991-92 ĝis la jaro 2009 *Renato Corsetti* kunlaboras kun la Fakultato de Psikologio, (poste Fakultato de Psikologio 1.) de la universitato "La Sapienza" kun instru-taskoj por la subjektoj: Observado de la Infana Konduto, Laboratorio pri Lingvo kaj Komunikado, Psikolingvistiko, kaj fine kiel profesoro pri Psikopedagogio de Lingvo kaj Komunikado.

4.2.2 Publikaĵoj

Libroj kaj aparte aperigitaj eseoj

Redaktis, eldonis = [itale] "a cura di". Por ŝpari lokon mi metis "red."

La ciferoj post la memstaraj publikaĵoj indikas la paĝo-kvanton.(DB)

- (1975) *Pri Esperanto Lingvo Internacia*, Budapest: Hungara Esperanto-Asocio. 24.
- (1976, red.) *Lingua e politica. Imperialismi identita' nazionali e politiche linguistiche in Asia Africa America Latina*, Roma: Officina Edizioni. 282.
- (1982) *Kiu faru kion - gvidilo por plenumo de la programo pri la Centjara Jubileo de Esperanto*, Rotterdam: UEA. 34.
- (1982, red.) *Una lingua per l'Europa e per il mondo*, Milano: FEI, quaderno k10. 1-2
- (1984, red.) *Diskriminacio*, Rotterdam: UEA. 178.
- (1984) kun Mauro La Torre, Nino Vessella: *Esperanto Corso di base*, Pisa: Edistudio.306.
- (1985) kun Elisabetta Cordovado e Fabrizio Pennacchietti *Esperanto - Introduzione alla lingua internazionale*, Milano: Coedes, traduzione ed adattamento all'italiano del corso di Imbert, Roger et al. (1984) edito dallo Internacia Kultura Servo di Zagabria. 98.
- (1987) *Knedu min sinjorino - Tabuaj kaj insultaj esprimoj en Esperanto* Paris, La Kancerklinikoteko. 38.
- (1990) *Slovník Hanlivých Vyrazu v Esperantu*, Praha: Klavis. 32.
- (1992) *Ĉu vi parolas tendare? Bildkurso por labortendaroj*, 4-a edizione, Rotterdam: TEJO. 98.
- (1992) *Salĉoj kaj aliaj rakontoj* adattamento all'esperanto dei format didattici elaborati per il tedesco da Artigal, Josep Maria e Taeschner, Traute, Roma: Università La Sapienza, Laboratorio Ricerche Comunicazione e Linguaggio. 51.
- (1993) *Macchina Daddy Lampo: Alcune osservazioni su un caso di trilinguismo dalla nascita in italiano, inglese ed esperanto*, numero speciale 1993 de l'esperanto, Milano: FEI. 32.
- (1993, red.) *Denaska dulingveco. Konsiloj por gepatroj*, Kajeroj por multlingveco, Rotterdam Universala Esperanto-Asocio. 25.
- (1993) kun Mauro La Torre: *Quale lingua prima? Per un esperimento nell'ambito dei Programmi linguistici della CEE sulla portata e sull'utilizzabilità del valore propedeutico della lingua internazionale esperanto*, Materiali di Interlinguistica ed Esperantologia 1, Milano: Cooperativa Editoriale Esperanto. 28.
- (1993) *Mamma mia: pri italoj por neitaloj* comunicazione presentata a Bydgoszcz e diffusa a cura del Miedzynarodowe Studium Turystyki. 20.
- (1994) kun Carlo Bourlot, Elisabetta Vilisics: *Ni faru kune!* Proponoj por agadoj en la Unesko-lernejoj, kiuj instruas la internacian lingvon en la kadro de la projekto FUNDAPAX Roma: E.R.A. 16.
- (1994) *Finding a Core Vocabulary for Young Learners: An Exercise in Decontextualization*, Technical Report No. 6, Roma: Laboratorio di Ricerche sulla Comunicazione e sul Linguaggio. 155.
- (1994) *Risultati dei test di conoscenza dell'olandese somministrati ai bambini della classe di scuola materna nell'anno scolastico 1993-1994* Roma: Laboratorio di ricerche sulla Comunicazione e sul Linguaggio. 30
- (1994) kun Anna Lerna: *Contenuto lessicale e grammaticale dei format didattici per l'inglese*

da 1 a 10, Rapporto tecnico n. 7, Roma: Università di Roma "La Sapienza" Dipartimento di Psicologia dei Processi di Sviluppo e Socializzazione. 144.

- (1995) kun Anna Lerna: *Contenuto lessicale e grammaticale dei format didattici da 1 a 10 per l'insegnamento dell'italiano a bambini stranieri*, Rapporto tecnico n. 8, Roma: Università di Roma "La Sapienza" Dipartimento di Psicologia dei Processi di Sviluppo e Socializzazione. 145.
- (1995) *Revisione della parte grammaticale e rifacimento degli esercizi* di Migliorini, Bruno *Manuale di Esperanto* Milano: CoEdEs. 162.
- (1995) kun Luigia Acciaroli, Mauro La Torre, Nino Vessella: *Lingua Internazionale Esperanto – Corso di Formazione a Distanza per gli Insegnanti Sperimentatori* Roma: Terza Università degli Studi di Roma - Laboratorio di Pedagogia Sperimentale. 600.
- (1995) *Vocabolario di base Italiano-Esperanto Esperanto-Italiano* Padova: Coordinamento Esperantista Veneto. 58.
- (1996) *Corso di Esperanto a distanza*, Milano: FEI-CoEdEs. 125.
- (1996) *Inter-, Trans- kaj Meta-Lingvo: Io parlo la pace*, Siena, Università per Stranieri di Speranza, Gaetano, Siena, Dipartimento di Scienze Umane. 169.
- (1996) kun Anna Lerna, Beronika Azpillaga, Sally Clifton Fearnside: *Lexical and structural content of formats 1 to 10 – Rapporto Tecnico n. 9* Roma: Università di Roma "La Sapienza" Dipartimento di Psicologia dei Processi di Sviluppo e Socializzazione. 70.
- (1997) kun Nino Vessella, Mauro La Torre: *Vocabolario Esperanto-Italiano Italiano-Esperanto* Roma: Federazione Esperantista Italiana. 60.
- (1997) kun Anna Lerna: *Contenuto lessicale e grammaticale dei format didattici per l'inglese da 11 a 20*. Rapporto tecnico n.10, Roma: Università di Roma "La Sapienza". Dipartimento di Psicologia dei Processi di Sviluppo e Socializzazione. 142.
- (1997, red.) *Italanto - La itala variaĵo de Esperanto* Milano: COEDES. 39.
- (1998) kun Nino Vessella, *Vocabolario Esperanto-Italiano Italiano-Esperanto*, Milano: COEDES. 108.
- (1999, red.) kun Nicolino Rossi: *Altigu vian lingvan nivelon: Literaturo en Esperanto* Milano: COEDES. 68.
- (1999, red.) kun Osmo Buller: *Kio ni estas kaj kion ni celas*, Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 24.
- (1999) kun Nino Vessella: *Manuale di esperanto – secondo livello*, Milano: COEDES. 320
- (2000) Guida – Le avventure di Hocus e Lotus, Roma: Dinocroc International Training Institute. 50.
- (2003) *Appunti di psicopedagogia del linguaggio e della comunicazione*, Roma: Edizioni Kappa. 258.
- (2004) *Indicazioni per l'utilizzo del sistema di analisi del linguaggio CHILDES*, Roma: Edizioni Kappa. 56.
- (2004 e 2005) kun TrauteTaeschner, P. Sabine. G. Francese: *The Magic Teacher's Kit*, Roma: Dinocroc International Training Institute. 64 + DVD.
- (2005) *L'esperanto dalla nascita: tra creatività e creolizzazione – alcuni aspetti dell'apprendimento della lingua internazionale dalla nascita*, Milano: FEI, numero speciale della rivista l'esperanto. 34.
- (2008, red.) *Vojoj de interlingvistiko: de Bruno Migliorini al la nuna tempo*, Pisa: Edistudio.130.
- (2010) kun Franciska Toubale: *Cours de langue internationale espéranto par le Saint Coran*, Palestrina: Islama Esperanto-Asocio. 76.

Artikoloj kaj kontribuoj

(1974) kun Giorgio Cardona, Mauro La Torre: *Lingvistiko kaj politiko en Raporto pri la*

- Seminario "Lingvo kaj Socio"*, Amsterdam: TEJO. 5-27.
- (1974) *Marksismo kaj lingva libereco en Raporto pri la Seminario "Lingvo kaj Socio"*, Amsterdam: TEJO, 1-4.
- (1976) *Comunicazioni internazionali: risvolti politici della situazione attuale e proposte per superarla*, en *strutture ambientali*, 30, settembre (septembro) 1976. 61-68.
- (1976) *La lingua come strumento politico* en Corsetti, Renato (red.) *Lingua e politica Imperialismi identita' nazionali e politiche linguistiche in Asia Africa America Latina*, Roma: Officina Edizioni. 7-24.
- (1976) kun Marcello Paccagnini *Istituti e vita sindacale dei crediti speciali* en Renzo Stefanelli *Bancari e banchieri*. Bari: De donato editore. 107-122.
- (1978) *Lingvo kiel politika ilo* en *Kontakto*, numeri: 1 e 2 del 1978. 16-19 kaj 9-11.
- (1980) *Seijiteki dogu toshitenno gengo*, Tokio: Tokia Esperanto-Ligo Studenta. 18-22.
- (1980) kun Mauro La Torre, Nino Vessella: *Pliriĉigo de la morfemaro en la internacia planlingvo*, en Szerdahelyi, István (red.) *Miscellanea Interlinguistica*, Budapest, Universita' Tecnica Eötvös Lorand. 368-379.
- (1980) *Le minoranze e il problema linguistico* in *Citta' e regione*, 3, 6.
- (1980) *Dialektoj kaj aliaj lektoj en la Internacia Lingvo* en *Kontakto*, numeri: 1, 2, 3, 4 del 1980. Respektive paĝoj: 12-13, 18, 13-15 .
- (1980) *La historio de KER: celoj kaj laboro* en Yves Bellefeuille *Internacia komunikado: aplikado de Esperanto* Rotterdam: TEJO. 41-47.
- (1980) kun Mauro La Torre: *Celaj kaj politikoj en la Esperanto-movado* en *La Verda Kolombo*, 1980, numeroj 64: 9-15, 65: 15-19, 66: 11-14.
- (1981) *Esperanto en la "tria mondo": faktoj kaj ŝancoj* en *Hungara Vivo*, 12/1981, 50-51.
- (1982) kun Mauro La Torre: *Celaj kaj politikoj en la Esperanto-movado* en *Hungara Vivo*, 5/1982, 174-179.
- (1983) kun Mauro La Torre, Nino Vessella: *Wzrost Ilosci Morfemow w Miedzynarodowym Jezyku Planowym* en Ejsmont, Tadeusz (red.) *Miedzynarodowa Komunikacja Jezykowa, Materialy Konferencyjne*, Lodz: Uniwersytet Lodzki. 236-246.
- (1983) *Esperanto kaj politiko* en *Monata Cirkulero*, 147, februaro 1983, 1-11.
- (1984) *Monda kulturo por monda lingvo* en Topan, F. Husein, E. *Salale*, Pisa: Edistudio 9-23.
- (1985) *Konata lingvisto kaj konata interlingvisto* en Migliorini, Bruno *Lingvaj aspektoj de Esperanto*, Pisa: Edistudio 5-6.
- (1986) *Early Language Differentiation in a Trilingual Child*, en Attili, G., Traute Taeschner *Development: European Perspectives. Second European Conference on Developmental Psychology* Roma: Istituto di Psicologia del CNR, pag. 105.
- (1987) *L'Esperanto in pratica: istruzioni per l'uso* en Chiti-Batelli, Andrea (red.) *La comunicazione internazionale tra politica e glottodidattica*, Milano, Marzorati Editore. 177-182
- (1988) *L'esperanto: una prospettiva* en *Dossier Europa*, 2, gennaio (januaro) 1988, rivista dell'ufficio Stampa e Informazione per l'Italia della Commissione delle Comunita' Europee. 89.
- (1988) *Scommettereste sull'esperanto?* en *Rivista culturale multilingue*, marzo 1988, 95-101.
- (1989) *L'esperanto: una lingua e un'idea* in *Tracce Trimestrale di Critica Radicale*, 7, 19-20, inverno 1989, 46-49.
- (1990) *Early Language Development of a Trilingual Child: The Role of Contrast*, en Rehbein, John, Taeschner, Traute (red.) *Dimensions of Bilingual Development* Clevedon: Multilingual Matters, 67-89.
- (1991) *Introduzione* en Peric' Altherr, A. *Ne facilas esti sloveno en Italio*, Trieste, IKEL, 3-11.
- (1992) kun Traute Taeschner: *Kiel trilingva infano lernas distingi inter lingvoj*, in *Internacia Pedagogia Revuo*, 22,3. 1-10.
- (1992) *Kiaj infanlibroj por nia esperanto?* en *Literatura Foiro*, 23,138, (junio) 1992, 173-174.

- (1993) kun Anna Lerna: *In-Context Teaching and Context-Bound Learning of Second Languages*, en Abstract Volume of the 5th EARLI European Conference, Aix-en-Provence: Universite' de Provence. 253.
- (1993) kun Mauro La Torre: *Paderborn e dintorni: Possibili condizioni per un esperimento sul valore propedeutico della lingua internazionale esperanto* en Rassegna Italiana di Linguistica Applicata, 3/1993: 115-136.
- (1993) *A Study of Lexical Acquisition in a Trilingual Child: The Role of Contrast* en Pinto, Maria Antonietta, Taeschner, Traute & Danesi, Marcel (red.) *L'approccio umanistico nelle scienze del linguaggio - Studi in onore di Renzo Titone*, Milano: ISFE. 239-262.
- (1994) *Andrea diras "ti-ta": Disaj observoj pri la kreoliĝo de Esperanto* en *Esperanto* 1, 4/1993: 62-64.
- (1994) *Premessa* en Lacquaniti, Silvia *Lingue Pianificate ed Esperanto. Una ricerca sui Problemi linguistici del loro funzionamento*. Milano: Cooperativa Editoriale Esperanto. 2-7.
- (1994) *Teaching Young Children a Second/Foreign Language with the Format: Rationale, Techniques and Some Results* en Abstracts of the 4th ISAPL International Congress, Dipartimento di Psicologia, Università di Bologna. 9-10.
- (1994) kun Traute Taeschner, Anna Lerna: *L'uso della narrazione per l'insegnamento della lingua straniera nella scuola elementare* relazione presentata al IV Congresso Nazionale della Società Italiana di Psicologia, Milano, ottobre 1994. 25-35.
- (1994) *Kiun lingvaron vi parolas? Observoj pri multlingveco kaj Esperanto en ĝi* en Tišljari, Zlatko (red.) *Internacia Familio - Utopio aŭ realaĵo* Maribor: Interkulturo. 49-53.
- (1995) *Enkonduko* en Csizsár Ernő, *Dulingve – Pli simple*, Kajeroj por multlingveco 2, Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. 5-11.
- (1995) *Postparolo kaj io alia* en Csizsár Ernő, E. *Dulingve – Pli facile* Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. 75-86.
- (1995) *Plurlingvaj familioj* en TEJO tutmonde 2, 68: 9-11.
- (1995) *Dvojezično od rojstva*. en Tišljari, Zlatko (red.) *Mednarodna družina – utopija ali realnost*, Maribor: Interkulturo. 11-31.
- (1995) kun Mauro La Torre: *Quale lingua prima? Per un esperimento CEE che utilizzi l'esperanto* en *Language Problems and Language Planning*, 19, 1: 26-46.
- (1995) *De la sumera al Esperanto – Instrumentoj tra la jarmiloj* en Michela Lipari, Pierluigi Da Costa (red.): *Instruado de Esperanto - Metodoj kaj Materialoj – Materiali di interlinguistica ed esperantologia* 3, Milano: CoEdEs. 1-7.
- (1996) kun Anna Lerna, Traute Taeschner: *A European Model for Teaching Foreign Languages to Children* en Abstracts of the 17th CESE Conference. 15-16.
- (1996) *Esperanto kaj kreolaj lingvoj: komunaj kaj malkomunaj trajtoj en la kreoliĝo* en Kosecky, Stanislav (red.) *Multkulturaj Familioj de nuntema Eŭropo* Bratislava: Esprima. 11-36.
- (1996) *A Mother Tongue Spoken Mainly by Fathers*, en *Language Problems and Language Planning*, 1996, 20, 3: 263-273.
